

Jarraporto 2019

traktota dum la landa kunveno 2021

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

Aperis 2 artikoloj:

Esperanto er eit levande språk. Ytring (opinieprimio) de Kjell Peder Hoff en *Norsk Tidend 2 /2019*, rebate kontraŭ implica aserto en n-ro 1 ke Esperanto kaj latino estas nur skribaj lingvoj.

Han vil lære deg esperanto. Intervjuo kun Henrik Håndlykken en *Telemarksavisa* 2. majo pri liaj spertoj pri Esperanto kaj oferto de kurso en la biblioteko de Skien.

Interreto

Ni havas retpaĝaron kaj retpoŝtan sistemon. Ilin administras Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith Parelle Abrahamsen. La retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Ni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL tie. Krom tio la ĝisdatigoj estis maloftaj, parte pro manko de taŭgaj novaĵoj. Ankaŭ NJE havas retpaĝojn, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

NEL havas la konton @esperantonytt ĉe *Twitter*, sed estis minimuma aktivado tie dum 2019 (unu mesaĝo). NEL estas ankaŭ en *Facebook* sed okazis neniu aktivado tie en 2019.

Informbudoj/prelegoj

La 7-an de septembro la klubo de Tromsø partoprenis grandan, lokan aranĝon: *Frivillighet i sentrum – libervoleco en la centro*, kun informbudo.

En Oslo estis tritaga informbudo dum la Mela-festivalo.

Informado en la norvega

Esperanto-nytt unupaĝa (A4) aperis regule, trifoje dum la jaro kaj estis dissendita rete al interesiĝantoj 104 (90) kaj al NEL-inform, kaj ni afiŝis ĝin interrete ĉe esperanto.no/e-nytt.

Ne eldoniĝis novaj broŝuroj en 2019. Ni ankoraŭ havas iomete da broŝuro *Oppdag esperanto* de 2012.

Informpetoj

Venis kelkaj informpetoj dum 2019, kaj rete kaj ĉe porde en la oficejo en Oslo.

B. Instruado

Ĉeesta kurso

Henrik Håndlykken aranĝis kaj gvidis enkondukan kurson en la biblioteko de Skien la 7an kaj la 14an de majo. Estis 6 partoprenantoj, plejparte junuloj.

Interretaj kursoj

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj, lernu.net kaj duolingo.com. Iuj certe lernas memstare per tiuj kursoj, sed ni ne scias kiom, ĉar nur kelkaj turnas sin al NEL aŭ loka klubo.

Ekzamenoj

La estraro proponas KER*-ekzamenojn por tiuj, kiuj volas havi ekzamenon.

* Komuna Eŭropa Referenckadro

Instruantoj

Neniu membro petis subtenon por lerni instruadon en 2019.

Faksekcio de instruistoj

La faksekcio daŭre malaktivitas. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL kaj la oficejo.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Landa Kongreso

31/5 – 2/6 okazis la Landa Kongreso en Tromsø. En la programo estis ŝipvojaĝo ĉe insularo, kaj vizito en *Polarmuseet*. La Landan Kunvenon partoprenis 13 membroj en Tromsø kaj 1 per skajpo. Aliaj 5 lokaj esperantistoj partoprenis la kromajn aranĝojn, ekskurson, festmanĝon.

Seminario por membroj

En 2019 ne okazis seminario, ĉar NEL havis Landan Kongreson.

Norvega Esperantisto

Ankaŭ dum 2019 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn. Eldoniĝis 6 numeroj, 4 havis 20 paĝojn, la aliaj 12 kaj 16 – inkl. de *Inter Ni Dirite* (la junularaj paĝoj) en la plej multaj numeroj.

Redaktis Douglas Draper; engaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelle Abrahamsen; presis n-ron 1 NTNU Grafisk senter, Trondheim, la ceterajn Land trykkeri, Dokka (je pli favora prezo).

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al 2 (2) norvegaj kaj 3 (4) eksterlandaj pagantaj abonantoj, 0 (1) norvega kaj 7 (7) eksterlandaj donacabonantoj; ni sendis ĝin senpage al 5 (5) norvegaj kaj ĉ. 25 (25) eksterlandaj ricevantoj (inter ili estraranoj de UEA), kaj interŝanĝe al ĉ. 20 (20) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Cetere ni sendis la gazeton papere kaj senpage al la najbaraj landaj asocioj kaj al tiuj de kelkaj malriĉaj landoj.

Tio estas sume iom sub la minimuma nombro (200) por havi rabaton pri la sendo. Ni suplementis sendante al norvegaj informpetintoj kaj interŝanĝe al aliaj landaj organizoj.

Retlistoj

La retoŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgrupp*a. Per ĝi estas atingeblaj 58 membroj (60), kaj sendiĝis 43 mesaĝoj (32).

La diskutlisto *NEL-diskut* estas malferma por ĉiuj. En 2019 membris tie 37 (37) personoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La liston administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 1 mesaĝoj (2).

Lokaj kluboj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2019 sendis la kluboj de Oslo, Tromsø kaj Trondheim.

Nur la Oslo-klubo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Trondheim kaj Tromsø havas retpaĝojn en TTT.

La klubo de **Oslo** kunvenis kiel tradicie, la unuan mardon kaj la trian lundon de la monato (krom en julio kaj aŭgusto). Okazis 18 (15) lund/mardaj kunvenoj kun anoncitaj temoj, kaj 2 (5) kromkunvenoj kun eksterlanda gasto. La unua marta estis la jarkunveno. La nombroj de ĉeestantoj en la ordinaraj kunvenoj variis de 4 (ĝis 7); meza nombro en la ordinaraj kunvenoj, inkl. de gastoj: 5,0 (5,0) – ĉ 12 % de la membraro.

Kiel ŝtatan subvencion por la jaro 2019 la klubo ricevis 4 360 kr (4 360 kr) tra la studasocio *Næring og samfunn*.

La klubo en **Tromsø** kunvenis 10 fojojn dum la jaro. Interalie vizitis la klubon esperantistoj el Pollando, Francio kaj Koreio. La klubo ankaŭ partoprenis en la procesio de la 17-an de majo.

Grupo Esperantista de **Trondheim** kunvenis ordinare 12-foje kaj krome okazis jarkunveno kaj du festoj. En la ordinaraĵ klubkunvenoj partoprenis 3–7 membroj, averaĝe 4,7. La klubo membras en *Grasrotandelen*, kaj ricevis de *Norsk Tipping* 2480,07 (3795,40) kronojn dum la jaro. Tra la studasocio *Næring og samfunn* la klubo ricevis 500 (500) kr.

Post plurjara dormado, ekde septembro okazas kunvenoj en **Bergen**, kutime en la kafejo de la urba biblioteko. Estis du tiaj kunvenoj antaŭ la jarŝanĝo.

La klubo de **Bryne** kunvenis 3-4 fojojn, hejme ĉe la membroj. La aliaj kluboj ne raportis iun agadon.

NEL-estraraj protokoloj

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn punktojn.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

Ne estis aktiveco en 2019.

Haveblas provizora listo de vortoj kiuj mankas en la norvega–Esperanto vortaro de 1963. 16 p. A5.

Turismo

Oficiale rajtigita ĉiĉerono pri Oslo en Esperanto, Cato Haugen, en 2018 transloĝiĝis al Telemark.

D. Administrado

Retservilo

Pro historiaj kaŭzoj la retdomajnnon esperanto.no formale posedis Akademisk esperanto-forum ĝis la 16-a de decembro 2019 kaj poste NEL transprenis. La retpaĝaro kaj retpoŝta sistemo situas ĉe la firmao Initio Medielab en Trondheim.

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado. La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto. Okazis 10 (8) retaj estraraj interkonsiliĝoj.

Teknikaĵoj

Herman Raner en Trondheim asistis la oficejon en Oslo pri komputilaj kaj telefonaj praktikajtoj, zorgante pri diversaj agordoj laŭbezono.

Esperanto-Domo (Esperantonia)

NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. Ekde 2008 la Oslo-klubo ricevas 60% el la luig-enspezoj.

Membrostatistiko por NEL en 2019

En 2019 NEL havis 6 aliĝintajn klubojn (6).

La membronombroj estis en 2019 (2018):

Bergen	10	(10)
Bryne	8	(7)
Oslo	46*	(46)
Stavanger	4	(4)
Tromsø	12	(16)
Trondheim	10	(13)
<hr/>		
Kluboj sume	90	(96)
Rektaj	30	(31)___
<hr/>		
Membroj entute	120	(127)

Eliris** 6 (8) membroj, kaj mortis 3 (0) membroj. Ni ekhavis 4 (3) novajn membrojn, kaj

1 (5) malnova membro remembriĝis.

Membroj laŭ kategorio:

Klubanoj:

Ordinaraj	55	(56)
Junulaj	10****	(14)
Samdomaj	7	(5)
Dumvivaj	19*****	(21)

Rektaj:

Ordinaraj	21	(22)
-----------	-----------	------

Junulaj	3	(3)
Samdomaj	0	(0)
Dumvivaj	6	(6)

Piednotoj:

* 4 Oslo-anoj ne plu loĝas (plentempe) en Oslo, sed restas Oslo-klubanoj

** eksiĝis dum 2019 aŭ ne pagis 2019. La eksiĝintoj kaj mortintoj restis membroj 2019 en la statistiko.

*** 4 el ili estas samdomaj

**** Unu el la dumvivaj estis ankaŭ samdoma

Ekonomio

La nova kasisto de NEL, Claude Rouget, elektita dum la landa kongreso en Tromsø en majo 2019, havis malfacilan taskon. Anne Karin Bondhus estis kasisto de NEL dum du jardekoj kaj ŝi havis superrigardon pri ĉio, prizorgis pri la financoj de NEL per ampleksa kaj kompleksa kalkulpaĝo, preskaŭ profesinivela.

Kunlabore kun la estraro, la kasisto proponis draste simpligi la jarkalkulojn, tiel ke ĉiu membro de NEL facile komprenu la sumojn. Tial la domkonto malaperis el la jarkakulo, kaj la nunaj kompilaĵoj malfacile kompareblas kun la jarkalkuloj de NEL 2017 (la lastaj kiujn Anne Karin sukcesis prepari dum sia malsano, vd. *Novega Esperanisto* 1/2019).

Spezokonto de NEL en 2019 estas pozitiva danke al malavara membro, kiu donacis grandan sumon por la domkonto. Ankaŭ kresko de la valoro de akcifonduso kontribuis al la pozitiva rezulto. Sed la membrokotizoj malkreskas kompare kun antaŭaj jaroj, pro ĉiam pli malgranda nombro de membroj. Sume la ekonomia situacio de NEL en 2019 ne estis malbona. Nur la tendenco pri daŭra malkresko de kotizantoj povas iom maltrankviligi nin pri la financa estonteco de la asocio.

Legaco Rolf Uhlen

La legaco Uhlen havas paĝon en nia retejo www.esperanto.no.

Ĝi donis subvencion al unu membro en 2019.

La kapitalo je la fino de 2019 estis 1 037 993 kr. (Netuŝebla: 702 326 kr.)

Reprezentantoj de NEL:

- Herman Ranes (prez.), kun anstataŭanto Leif Arne Storset
- Judith Parelle Abrahamsen (kas.), kun anstataŭanto Marianne Lund

Ĉar Norvega Esperantista **Fervojista** Asocio (NEFA) en la realo malfondiĝis (pro mankantaj membroj), la reprezentantoj de NEL pretigis novan statuton de la legaco, kiun la estraro de NEL aprobis (la 6an de majo 2019) kaj kiu estos sendata al *Stiftelsestilsynet* por aprobo.

Norvega Junularo Esperantista

En 2019, NJE aranĝis du kunvenojn:

- La landan kunvenon de NJE, en kiu la plejmulto de la membroj partoprenis rete
- Someran kunvenon kun ekskurso al Langøyene (en Oslo-fjordo) en julio.

Krom tiuj aranĝoj, partoprenis membroj de NJE en diversaj internaciaj kunvenoj.

Ni ankaŭ aranĝis Mojosan Vesperon, nian kutiman retan babilkunvenon, kvinfoje dum 2019. Partoprenis kutime inter 5 kaj 7 personoj, el Norvegio kaj aliaj nordaj landoj.

Inter Ni Dirite, la junulara sekcio de *Norvega Esperantisto*, aperis kvarfoje dum 2019.

NJE aranĝis unu estrakunvenon dum 2019.

La estraranoj, elektitaj ĝis 2019, estis la jenaj:

- prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- vicprezidanto: Matias Särkelä Jentoft
- sekretario: Leif Arne Storset
- kasisto: Hilde Lagnason Bye

La estraranoj post elektoj dum la landa kunveno en 2019 estas la jenaj:

- prezidanto: Vidar Benjamin Skretting
- vicprezidanto: Henrik Håndlykken
- kasisto: Jacob Grevstad
- sekretario: [ne elektita]

Jacob Grevstad reprezentas NJE-on en TEJO kiel Komitatano A.

Biblioteko

En Esperantonia ni havis en 2019 ĉirkaŭ 30 bretometrojn da libroj kaj kajeroj. Centra responsulo pri la Biblioteko estas Douglas Draper. Librojn kiujn ni havas 2- aŭ pli-ekzemplere ni ofertas per www.esperanto.no → movado → biblioteko por po 20 kr. Preskaŭ neniu aĉetis.

Granda kolekto da Esperantolibroj troviĝas ankaŭ en la Nacia Biblioteko de Norvegio en Mo i Rana, de kie oni senpage povas prunti per ajna loka biblioteko.

El ĉ 45 skatoloj da libroj forsenditaj al la deponejo tie en 2010 (ili akceptas po 1 ekz., sed de nordiaj 2, kaj de norvegaj 3), restas ne malfermitaj 16, ĉar nia membro Hilde Dahlberg ne plu rajtas registri ilin en sia labortempo. Tial ni ne povas scii kiuj libroj ne jam troviĝas en la deponejo. En la kolekto de Pepita de Caspary (ĉ 5 bretometroj), kiun ni heredis en 2018, povas esti libroj kiuj mankas tie.

La kluboj en Bryne kaj Stavanger heredis la librokolekton de Anne Karin Bondhus. La librojn, dokumentojn, kiujn oni ne povas uzi aŭ disdoni tie, oni sendos al la biblioteko de NEL por kompletigi nian kolekton. Kromajn ekzemplerojn ni povos provi vendi aŭ forsendi al dezirantoj en eksterlando.

Studenta Esperantosocieto

La societo ne estas formale malfondita, sed ekde 2013 ne estas aktivuloj ĉe la universitato de Oslo.

Internacia organizo

Komitatano A de UEA estas Kjell Peder Hoff.

Ĉefdelegito de UEA, Agnar Fitjar, peris informon de UEA pri 25 (31) membroj de NEL kiuj estis ankaŭ individuaj membroj de UEA en 2019, laŭ kategorioj jenaj:

Membro-Abonanto : 9 (10)

Membro Baza (antaŭe kun Jarlibro aŭ kun Gvidlibro) 12 (14)

Dumviva Membro: 4 (6)

Aliaj membrokategorioj:

Societo Zamenhof: 4 (1)

Patrono de TEJO: 1 (2)

Dumviva Patrono de TEJO: 1 (1)

Universala Kongreso

8 (11) norvegoj aliĝis al la 104-a Universala Kongreso, kiu okazis en Lahtio, en Finnlando (Portugalio).

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj

NEL estas membro de la studasocio *Næring og samfunn* kaj membro de *FN-sambandet*.

Douglas Draper partoprenis en la jarkunveno de la studasocio. Asbjørn Lindh reprezentis NEL dum kunveno de *FN-sambandet*.

La estraro de NEL estis

ĝis la landa kunveno en 2019:

- prezidanto: Mario Machlik
- vicprezidanto:
Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Ulf Lunde
- kasisto: Anne Karin Bondhus
- estrarano: Lars Sandbakk
 - anstataŭanto 1: Amelie Matt
- anstataŭanto 2: Heming Welde
Thorbjørnsen

La estraro de NEL

estis post la landa kunveno en 2019:

- prezidanto: Mario Machlik
- vicprezidanto:
Jardar Eggesbø Abrahamsen
- sekretario: Bård Hekland
- kasisto: Claude Rouget
- estrarano: Lars Sandbakk
 - anstataŭanto 1: Amelie Matt
- anstataŭanto 2: Herman Ranes

E. Resumo

La morto de nia multjara kasisto Anne Karin Bondhus en majo 2019 estis granda perdo por NEL. Anne Karin estis fideinde kaj akurate prizorganta la ekonomion de nia asocio dum plenaj du jardekoj. La nova kasisto, Claude Rouget, faris grandan laboron por faciligi la sistemon, tiel ke ĝi povas esti prizorgata de ne-fakulo en pli efika maniero. Tiel estas farita grava paŝo por certigi la pluvivon de nia landa asocio.

Malgranda estis la Landa Kongreso en Tromsø, sed la ĉeestantoj aprezis kaj la konstruajn kaj bonetosajn diskutojn kaj la ekskursojn kaj aliajn ne-formalajn erojn. Ni dankas al La Norda Lumo por bona prizorgado!

Tiu kongreso estis la unua, en kiu eblis almenaŭ parte partopreni distance tra la interreto. NEL tra la lastaj jardekoj parte transiris al pli «reta» funkciado. Niaj estrarkunsidoj estas ne kunaj, ni sidas dise en la lando. Ni havas bonan retejon, sed tre malmulte videblas en sociaj retoj. Malpli aktivaj niaj retroŝtaj diskut- kaj informlistoj, sed ilin ne anstataŭis novaj retaj kunagadformoj.

Longtendence falas la nombro de membroj kaj aktivaj kluboj. La restantaj kluboj tamen restas grava «gluo» inter niaj aktivuloj. Por esti motivata ion fari por la lingvo, necesas ion interesan fari per ĝi. Grava defio por NEL estos kaj helpi vivteni la surlokajn uzadon de Esperanto en Norvegio kaj utiligi la eblojn kiujn donas la novaj teĥnologioj.

La 24an de septembro 2020

La Liga Estraro

Mario Machlik

Jardar Eggesbø Abrahamsen

Bård Hekland

Amelie Matt

Herman Ranes

Claude Rouget

Lars Sandbakk

Spezokonto de Norvega Esperanto-Ligo

2018 2019

Rimedoj			<i>Noto</i>
Membrokotizoj	36 180	33 637	
Oslo-kluba kontribuo al domluo	15 200	15 200	
Donacoj (specifcelaj k. ĝeneralaj)	15 029	17 580	1
Luigo de kunvenejo (al ne-esp.)	3 946	1 280	
Kotizoj al skandinava kongreso	20 800	—	
Vendoj kaj abonoj	1 574	967	
Aliaj enspezoj	150	416	
Sumo de la ordinaraĵ rimedoj	92 879	69 080	
Kostoj			
Oficejo/domo (lupago, elektro, ktp)	32 276	38 340	2
Revuo (presado kaj sendado)	18 436	12 964	3
Landa/skandinava kongresoj	21 682	—	
Kotizoj plupagataj al kluboj	7 170	6 740	
Subteno al Norvega Junularo Esp.	2 500	2 500	
Kotizo al UEA (aligitaj membroj)	1 188	1 443	
Kotizoj al eksteraj organizaĵoj	2 250	2 250	
Aliaj kostoj	4 745	4 440	4
Sumo de la ordinaraĵ kostoj	90 247	68 677	
Bankaj kaj financaj (mal)profitoj	-6 038	16 793	5
Eksterordinaraĵ enspezoj		4 868	6
Saldo spezoj	-3 406	22 064	

Noto

- 1 Donacoj al domkonto: kr 15 000; ĝeneralaj: kr 2 580
- 2 Luo: kr 24 299; elektro: kr 7 292; asekuro: kr 4 567
- 3 Presado: kr 3 550; sendado: kr 9 414
- 4 Flegado de tombo de Haldor Midthus: kr 1950
- 5 Skagen Vekst kaj Høyrente kreskis je kr 16 775.
- 6 Nuligo de malnovaj ŝuldoj (2017 kaj antaŭe)

Bilanco de NEL je 31-a de decembro**2018****2019**

Aktivoj			<i>Nota</i>
Oficejo (simbola valoro)	97 667	97 667	
Akcioj (Skagen-fondene)	190 002	206 777	
Debitoroj/malŝuldoj	13 910	14 080	7
Norvega ILEI-sekcio	11 233	11 238	
Kontoj ĉe UEA kaj FEL	5 743	5 500	
Aliaj bankkontoj + kaso	67 024	63 621	
Sumo de la aktivoj	385 578	398 883	
Pasivoj			
Ĝenerala kapitalo	244 156	240 750	
Saldo spezoj	-3 406	22 064	
Propaganda fondaĵo	47 167	47 167	
Studfondaĵo	45 344	45 344	
Domkonto	23 593	23 593	
Deponaĵoj de lokaj E-klubo	9 664	14 965	8
Ŝuldoj (kreditoroj)	19 060	5 000	9
Sumo de la pasivoj	385 578	398 883	

Nota

- 7 E-klubo de Oslo: kr 13 280; Sameiet O.S. vei 12-18 (luigo de kunvenejo) kr 800
- 8 En 2018 tuta sumo koncernis nur klubon de Bergen; en 2019: Bergen kr 9664; Bryne: kr 5301
- 9 Subteno al NJE: kr 5000

Claude Rouget, kasisto

Mallongigoj/ forkortelserUEA Universala Esperanto-Asocio / *Verdensforbundet*UK Universala kongreso / *Verdenskongress*ILEI Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj / *Lærerorganisasjonen*

AMo Aktivula Maturigo

VK Virtuala Kongreso

FEL Flandra Esperanto-Ligo